



Jerzy Grum, Varsovio

nun prelegas en  
F R Germanio!

**Eldonanto/Herausgeber:**

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

**PILO-PRESS**

Internacia

Vidu PP 40/76

Informservo

N-ro 41/76 - 19 okt 1976

Aperas ĉiusemajne

### Pola Esperanto-Kongreso

Szczecin (pp) - En ĉeesto de 450 personoj okazis de la 15-a ĝis la 17-a de oktobro en ~~Szczecin~~ la 19-a Pola Esperanto-Kongreso kaj la Tutlanda Kunveno de la Delegitoj de Pola Esperanto-Asocio. Kiel gastojn partoprenis reprezentantoj de la Esperanto-Asocioj el socialismaj landoj kaj la vicprezidanto de UEA, d-ro Werner Bormann, Hamburgo. Dum la kunveno oni elektis novajn instancojn de la pola Esperanto-movado, honorajn membrojn de Pola Esperanto-Asocio kaj transdonis honorajn diplomojn.

Pri la inaŭguro de la kongreso, kiu havis lokon vendrede, la 15-an de oktobro, raportis la Esperanto-redakcio de Pola Radio jam en sia posttagmeza radia ĵurnalo samtage. Dum la dimanĉa kongresa fermo oni akceptis rezolucion.

### Pri la Internacia Esperanto Klubo Aŭtomobilista

Parizo (pp) - Laŭ la protokolo de la kunveno de Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (I.E.K.A.) ĉi tiu klubo nun havas 1006 membrojn en 31 landoj. La plej multaj membroj estas laŭvice en Francujo (189), Britujo (105), Germanujo (97), Nederlando (95), Italujo (93). Estas interese, ke en Argentino estas 39 membroj.

Al la ĝis nun dupersona estraro, D-ro Werner Bormann, prezidanto, kaj J. Guillaume, sekretario, estis alelektita kiel vicprezidanto C. Tresorier, Göttingen, F R Germanujo. Multaj landaj perantoj sendis raportojn pri la laboro kaj situacio en la koncernaj landoj. Dum la kunveno la 21 personoj el 10 landoj konsentis, plialtigi la kotizon al 2 usonaj dolaroj. Estis esprimita la deziro, ke pli multaj esperantistoj en diversaj landoj fariĝu delegitoj por aŭtoservo. Estas grave scii, ke oni ne postulas teknikajn servojn, sed nur helpon per tradukado kaj eventuale kontakton kun riparejoj ktp.

Post la oficiala fakkunveno okazis vigla kaj interesa diskuto pri la sekureco en la trafiko. La debaton enkondukis s-ro Guillaume.

La sekretaria adreso estas: S-ro J. Guillaume, 66, de Grasse Village, F-78810 Feucherolles, Francio.

### Konferenco pri turismo

Bydgoszcz (pp) - De la 28-a de novembro ĝis la 5-a de decembro 1976 okazos en Bydgoszcz kaj Zakopane konferenco de Monda Turismo kaj la 2-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo.

Celo de ĉi tiu aranĝo estas evoluigi internacian Esperanto-turismon. Estos eblecoj pridiskuti formojn de kunlaboro, diskalkulsistemojn, transpagajn problemojn kaj programojn de internacia Esperanto-turismo por la jaro 1977. Dum la konferenco oni prilaboros Turisman Esperanto-Kalendaron por 1977. La foiro de Esperanto-turismo celas plivastigi la internacian turisman Esperanto-kunlaboron.

Aliĝojn akceptas resp. informojn donas: "Juventur", str. Jagiellńska 12, PL-85-067 Bydgoszcz, Pollando. La partoprenkotizo por la tuta semajno, inkl. tranoktoj, manĝoj, busvojaĝo kaj programo, estas 2 400 zlotoj aŭ 80 US-dolaroj.

## Rezolucio de blinduloj

Stubenberg (Aŭstrio) (pp) - Ankaŭ la ĉi-jara 44-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, okazinta en Stubenberg (Aŭstrio) de la 24-a ĝis la 30-a de julio, pri kiu ni jam raportis, akceptis rezolucion. Ĉi-sekve ni publikigas la rezolucian tekston:

1. La Internacia Lingvo estu instruata pli ol ĝis nun kiel fakultativa lernobjekto en la lernejoj, precipe en la blindullernejoj. La junularo daŭre estu pli intense atentigata pri la graveco de Esperanto por internacia interkompreniĝo.
2. Oni instigu radiostaciojn, pli multe disaŭdigi programojn en Esperanto, atentigante pri la aparta signifo de la radio kiel amaskomunikilo por blinduloj.
3. "Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE)" daŭre celas publikigi verkojn en Esperanto-brajlo. Por atingi tiun celon, ĝi bezonas pli multe da financaj subtenoj de la diverslandaj blindulasocioj.
4. Pro daŭre kreskanta signifo de vojaĝado internacia, ankaŭ por blinduloj, oni klopodu enkonduki rabatojn al blinduloj kaj iliaj gvidantoj por translimaj vojaĝoj same kiel oni jam praktikas ilin sur nacia nivelo.
5. Konstatante ke ankoraŭ ekzistas en multaj landoj problemoj pri enlaborigado de blinduloj kaj ke laborrapidecoj kaj -rezultoj de blinduloj povus esti malpli ol centprocentaj, la kongreso rekomendas ke
  - a) neniu blindulo estu senlabora pro tio ke liaj rezultoj estas limititaj kaŭze de handikapo;
  - b) la rajton labori/ne forprenu de blindulo eĉ se tiu laboro estus interrompata; oni
  - c) oni ne apliku la priskribon "nelaborpova" al blinduloj senlaboraj, kiam laboro taŭga estas netrovebla, aŭ por kaŝi neadekvatajn enlaborigajn servojn;
  - d) nur tiuj blinduloj kiuj havas severajn kromhandikapojn, estu nomataj "nelaborpovaj";
  - e) kie jam ekzistas proceduroj por mezuri laborkapablecon de blinduloj, oni ilin rekonsideru kaj, se necese, renovigu; kie ne ekzistas tiaj proceduroj, oni ilin startigu;
  - f) ĉar moderna teknika evoluado ofte rezultigas maldungon de blinduloj, tiuj kiuj havas respondecon pri trejnado kaj enlaborigado de blinduloj, devus vigne serĉ-enketi kaj eltrovi novajn laboreblecojn por blinduloj.

La kongreso rekomendas al "Tutmonda Konsilantaro por Bono de la Blinduloj", precipe al ĝia "Eŭropa Regiona Komitato", fari ĉion necesan por realigi la supremenciitajn rezoluciojn.

Subskribis la kongresaj sekretarioj: Hans Breitenbach (Germanujo)  
Walter Wagner (Aŭstrujo)

\*\*\*\*\*

## AGFA-GEVAERT respondas

Romo (pp) - La Esperanto-redakcio de Radio Roma ricevis leteron, oficiale verkitan en Esperanto, de la mondkonata firmao AGFA-GEVAERT. La letero tekstas:

"Kun ĝojo ni eksciis, ke Radio Roma dum unu el siaj elsendoj disaŭdigis komunikon pri AGFA-GEVAERT. Ni tre dankas vin pro tio, kaj ne preterlasos estonte informi vin pri aliaj sciindaĵoj pri kiuj povus interesiĝi viaj aŭskultantoj."

Kiel konate, AGFA-GEVAERT ĵus eldonis serion de diapozitivaj, kun akompana sonbendo en Esperanto, pri siaj aparatoj. Okaze de la Esperanto-ekspozicio en München antaŭ unu semajno oni prezentis tiujn diapozitivajn kaj la tekston.

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen renomoj

Werner Dickel, fervojisto-esperantisto el Nordrejn-Vestfalio, parolos la 28-an de oktobro 1976 en Radio Luxemburg Rtl (Luksemburgo) pri "Esperanto kaj la fervojo" en la tagmeza elsendo inter la 12-a kaj 14-a horo.

Jerzy Grum, konata Esperanto-redaktoro de Pola Radio, Varsovio, res-tadas de la 20-a de oktobro ĝis 4-a de novembro 1976 en F R Germanio por prelegvojaĝo. (Vd. PP n-ro 40/76 p. 1!)

D-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA, Hamburg, parolis pri "Luktoj kontraŭ diskriminacioj" dum la 19-a Pola Esperanto-Kongreso en Szcecin, pri kiu ni raportas sur p. 1. S-ino Elsbeth Bormann dum la sama kongreso parolis pri la agado de virinoj en UEA.

Andrzej Pettyn, Varsovio, redaktoro de Pola Radio kaj aŭtoro de Espe-ranto-lernolibroj, estis elektita honora membro de Pola Esperanto-Asocio.

La Esperanto-Redakcio de Pola Radio, Varsovio, dum la ĉi-jara Pola Esperanto-Kongreso ricevis honoran diplomon de Pola Esperanto-Asocio rekone de la meritoj pri la evoluigo de la "ĵurnalisma lingvo de Esperanto". - La saman diplomon ricevis la redakcio de la pola ĵurnalo "Ilustrowany Kurier Polski", kiu de multaj jaroj regule publikigas informojn kaj artikolojn pri Esperanto. Inter la publikigitaj informoj estas regule ankaŭ tradukitaj informoj el Pilo-Press.

Sekve de intervjuo kun la soveta sciencisto M. Isajev, Moskvo, prezidanto de la komitato okupiganta pri la internaciaj interrilatoj de la sovetaĵ esperantistoj, aperis artikolo en la revuo "Sovet-Unio" kun la titolo "Lingvomuro - kiel ĝin venki".

La 17-an de aŭgusto 1976 mortis la aŭstra esperantistino Margarethe Jonas, la vidvino de la Federacia Prezidento Franz Jonas.

Richard Schulz, Minden, la aŭtoro de "Mein geliebtes Esperanto", parolis la 11-an de septembro en Parizo antaŭ la "amikoj de Strigo-segulo" pri la ekmigrado de Til' Strigospegul' en Esperantuĵon. Lia Esperanto-traduko de Strigospegul' antaŭvideble aperos venontan jaron ĉe Bleicher-eldonejo.

Esperanto en radio

Varsovio. Sian aktualecon, ankaŭ rilate al Esperanto, Varsovio pruvis denove rilate al la raportado pri la 19-a Pola Esperanto-Kongreso kaj la Tutlanda Kunveno de Delegitoj de PEA en Szczecin. Jam en la vendreda posttagmeza kaj vespera radiaj ĵurnaloj oni povis aŭdi informojn pri la kongresa inaŭguro. La venonta Esperanto-Ekspreso estos komplete dediĉita al la kongresaj aranĝoj. La diskutoj pri la formo kaj enhavo de la "leterkesto" daŭras. Ĉi-foje grave kontribuis finna aŭskultantino per ŝajne konvinkaj argumentoj, ĉar la redakcio rezignis en la ĉiusemajna statistiko pri la cito de la nombro da korespondaĵoj, kiujn alsendis la "redakciaj kolonoj" inter la aŭskultantoj. Sendube estas fakto, ke ĝuste tiuj "kolonoj" per siaj sensaciaj korespondaĵaj nombroj aktivigis la korespondan bilancon. Tamen restas la ĉefa problemo: Kiamaniere atingi, ke ĉiu aŭskultanto almenaŭ unufoje en la monato aŭ semajno skribu al la redakcio. Tiu ideala stato ne nur estas la afero de la redakcio, sed de multaj aŭskultantoj kiuĵ partoprenas an la diskuto.

Vieno. La Esperanto-redakcio de ORF vere meritis pli da aktiva subteno fare de la esperantistaro per pli multaj alskriboj. Tre interesa estis denove la semajna komentario de d-ro Alfred Macher pri minoritataj problemoj en Aŭstrio.

# Konkurso de Pola Radio

10-tagaj ekskursoj — valoraj objektaj premioj

La Pola Radio anoncas novan konkurson por siaj eksterlandaj geaŭskultantoj. 10-tagajn ekskursojn kaj valorajn objektajn premiojn povas gajni ĉiu aŭskultanto, kiu donos respondon al jenaj demandoj:

- 1) Kiujn polajn artiklojn oni povas aĉeti en via lando kaj kiel vi pritaksas ilin? Kiuj polaj artikloj (produktaĵoj) ĝuus tie sukceson?
- 2) Kiel vi vidas la perspektivojn de la plua evoluo de la kunlaboro de via lando kun Pollando? Kio laŭ via opinio pozitive kontribuos al la plivastigo de tiu ĉi kunlaboro?
- 3) Kiel vi pritaksas la servan agadon de polaj transportaj entreprenoj (polaj aerlinioj LOT, polaj oceanaj linioj, internaciaj aŭtomobilaj transportoj PKAES, polaj ŝtataj fervojoj kaj de la turisma oficejo ORBIS)?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Polskie Radio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa,  
Pollando

en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso" - ĝis la 31-a de decembro 1976 j. (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncos en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro 1977 kaj en la marta numero de la revuo "Pollando".

Ni deziras bonŝancon en la lotado de la premioj. Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn.

POLSKIE RADIO Warszawa